



Pledi por defendo de la gepatra lingvo



Jam proksimiĝas unu plia okazo kunagadi okaze de la tago de la gepatra lingvo, la 21-an de februaro, kiam la Unesco invitas ĉiujn landojn kaj organizojn rilatajn agadi por emfazi la gravecon protekti la gepatran lingvon.

Cetere, esperantistoj estas kunvokataj ĉiam elpruvi la valorojn de Esperanto kiel lingvo kiu rolas kiel ponto inter kulturoj, kiu helpas firmigi nian identecon pro la reala okazo proksimiĝi al aliaj kulturoj kaj lingvoj. Ni kiel esperantistoj ofte devis lerni kiel kondukti kaj esti bona gasto en aliaj kulturoj. Ni devis observi kaj konscie lerni la diferencojn, sed ĉu ni ĉiuj iam pripensis kiel respekti kaj respektigi alies lingvojn kaj kulturojn en konkretaj cirkonstancoj? Certe indas diskonigi nian lingvan trezoron, sed unue ni devas konscii pri ĝi.

Kiel amerikanoj ni sentas ke nia kontinento, spite al sia vasteco geografia, permesas relative facilan aliron al komunikeblecoj pro la fakto ke apenaŭ kvar lingvoj, tiel nomataj grandaj lingvoj, taŭgas por komunikado. Ni mem ĝuas la avantaĝon ke nia gepatra lingvo, la hispana, ebligas la privilegion uzi ĝin ne nur hejme, sed ankaŭ lerneje, laboreje, surstrate, en ĉiuj sferoj de nia vivo. Tamen, ĉu tia estas la realo en nia kontinento?

Kune kun la hispana lingvo, en Ameriko kunvivas ĝiaj diversaj variantoj, kiel la kolombiaj, kaj kelkaj kreolaj specoj de la angla lingvo, la franca, la portugala, sed la plej gravaj estas la nomataj indiĝenaj lingvoj, ne nur pro la nombro, sed ankaŭ pro la identosenta enhavo kiun ili kunportas en sia karaktero de lingvoj de la originaj popoloj de Ameriko; cetere, laŭlonge de kvin jarcentoj ili kapablis kunvivi kun la hispana lingvo kaj transvivi longan periodon de entrudiĝo kaj apartigo.



Kiel sciante, lingvoj distingas la popolojn kaj kunportas ties sistemon de kulturaj valoroj; ili estas grava faktoro en la identeco, la radikeco de la homoj, tio estas, nacieco kiel koncepto; ili ankaŭ konsistigas unuigilon, tio estas, ene de unu nacio kaj ankaŭ en grupo de nacioj kiuj uzas saman lingvon, kiel estas la kazo de la hispanameriko.

Nuntempe oni ne povas forgesi ke la superrego de unu lingvo kunportas entrudiĝon de unu kulturo. En la nuna mondo kie globaligo emas altrudi unuecigitajn modelojn agi kaj pensi, ankaŭ povus estiĝi la risko ke nia lingva kaj kultura estonteco fariĝu unulingva kaj unukultura; tamen la realo estas tute alia.

La kulturo de rezistemo pli kaj pli vokas la popolojn batali por protekti la lingvan diversecon, kio rezultas el protektado de la gepatra lingvo. Bedaŭrinde tion oni ne ĉiam efike faras kiel prave asertas UNESCO-specialistoj, kiuj prognozas ke ene de “kelkaj generacioj pli ol 50% el la 7000 lingvoj parolataj en la mondo povos malaperi. (...) Miloj da lingvoj, malgraŭ tio ke ĉiu estas regata de homgrupo, kiu ĝin uzas kiel ĉiutagan komunikilon, forestas el la eduksistemoj, komunikaj rimedoj, eldona industrio kaj ĝenerale el la publika vivo.”

Ĝuste tial UNESCO alvokas la landojn protekti la kulturen identecon kaj respekti la diferencojn etnajn, religiajn, lingvajn kaj kulturajn, ĉar “lingvo estas vizio de la mondo, alia maniero pensi kaj organizi la realajn kaj mensajn objektojn”.

Esperanto dum sia pli ol centjara ekzisto montris al ni ke ĝi estas taŭga konservilo por lingva diverseco kaj samtempe ebligas interkulturen komunikadon. Kiel ni povus montri al la mondo en kohera formo tiujn ĉi du faktojn de nia komuna sperto?